OFICIALA ORGANO DE "GRUPO ESPERANTO KAJ FRATECO"
5-a Jaro - BAGÉ, (R.S.) BRASIL - (Brazilo) - Marto, 1969 - N-ro 56

SIGNOJ

Via konversacio montras direktojn elektitajn de vi en ia vivo.

———

Viaj decidoj en la gravaj horoj malkaŝas la efektivan gradon da evoluo de via spirito.

———

Viaj gestoj en la ordinara lukto esprimas vian internan mondon.

———

Viaj impulsoj difinas la mensan regionon, en kiu vi preferas moviĝi.

———

Viaj pensoj montras vian spiritan societon.

———

Viaj legaĵoj karakterizas viajn sentojn.

Andreo Ludoviko, tradukita de A.K. Afonso Costa. (El la verko "Kristana Agendo")

(Daŭrigos)



- La Komenco de la Historio -

En la jaro 1848, en la vilaĝeto Hydesville, Ŝtato Nov-Yorko, Usono, loĝis John D. Fox kun sia edzino Margaret kaj du filinoj: - Margaretta, 15-jara, kaj Katie, 12-jara.

En la nokto de 31 de Marto de tiu jaro la knabinoj ektimis pro fortaj frapoj en la ĉambron de siaj gepatroj.

S-ro John D. Fox eliris kaj rigardis ĉirkaŭ la domo, sed neniu estis tie. La frapado tamen daŭre ripetadis plu. Iom post iom la knabinoj konvikiĝis, ke la frapanto ne estas danĝera, forpelis la timon kaj alparolis lin. Per interkonsentita nombro da frapoj li respondis la demandojn pri ciferoj - aĝo, nombro da infanoj k.s. - ĉiam ĝuste. Oni proponis al li interkonsentitan abocon per frapoj kaj li rakontis sian propran historion. Li estis kolportisto 31-jara, nomata Charles Rosma, havis kvin infanojn: tri knabinojn kaj du knabojn. Antaŭ kvin jaroj oni murdis lin en tiu domo por rabi kvincent dolarojn, kiujn li tenis. Lian kadavron oni enterigis en la kelo de tiu domo.

La familio Fox kaj ties najbaroj fosis en la kelo por serĉis la kadavron, sed la loko estis marĉa kaj akvo kun koto inundis ĉiun fosaĵon. Oni devis forlasi tiun klopodadon ne trovinte la kadavron.

La knabinoj forvojaĝis: Margeretta iris al Rochester, N. J. en la hejmon de sia edzinigita fratino S-ino Fish; Katie veturis al najbara urbo.

En ambaŭ lokoj da frapoj komenciĝis kaj aliaj personoj konstatis, ke ankaŭ ili havas la povon ricevi tiajn inteligentajn frapojn. Tiuj provoj fariĝis epidemio en Usono kaj transsaltis la oceanojn kaj disvastiĝis en Anglujo, k.a. landoj tra la mondo.

Oni forte kalumniis la fratinojn Fox, sed malgraŭ tio la frapoj furoris tra la mondo kaj tiel naskiĝis Spiritismo.

Nur 56 jarojn pli poste, kiam la frapoj en Hydesville jam estis tute forgesitaj, ju okazintaĵo pravigis la historion de Charles Rosma.

La 23-an de Novembro 1904, la "Boston Journal" publikigis artikolon pri la eltrovo de homa skeleto en la kelo de ruinigita domo en Hydesville. La iama loĝejo de familio Fox estis nun forlasita ruinaĵo kaj iuj knaboj, revenantaj el lernejo, tie haltis por ludi en la ruinoj, kaj konstatis, ke en la kelo estis falinta interna muro, iam starigita paralele kun la ekstera, kaj inter tiuj du muroj kuŝis homa ekeleto kaj fera kofro.

Tiuj estis restaĵoj de Charles Rosma, murdita tie antaŭ 61 jaroj, fare de antaŭaj loĝantoj en tiu domo nun ruinigita.

La fosado en la kelo neniam trovus la kadavron, ĉar ĝi kuŝis post la interna muro de la kelo dum oni fosis nur interne, supozante, ke tiu muro estis ekstera.

La asertoj de la mortinto estis do veraj kaj similaj faktoj okazas ĝis nun en aliaj lokoj de la mondo. Spiritismo renaskiĝ- ĉiam, ĉar ĝia fundamento estas naturaj faktoj kiuj ĉiam ripetiĝas.

Nun ekzistas tre riĉa kaj bela mediumeca literaturo, kiu kreskas kun ĉiu tago.

Tiuj faktoj estas eternaj. Ties neperfekta observado naskis la malvonajn mitologiojn, religiojn, superstiĉojn; ilia pli detala studado en nia tempo estas la kreskanta vivo de Spiritismo.

(Daŭrigo sur paĝo 4-a)

MARTO, 1969

5-a Jaro N-ro 56

Esperanto - Aldono

Senpaga presajo flugfolie disdonata pomulte al spiritismaj gazetoj por propagando de Esperanto-Movado

—o—

Oficiala Organo de

— Grupo Esperanto kaj Frateco —

Av. General Osório, 1737 - C. Postal 369
BAGE — Rio Grande do Sul — BRASIL

—o—

Respondeca Redaktoro
CARLOS DE ALMEIDA WUTKE
Uberlândia, MG.

Redaktorestro
JOÃO SEVERO

Sekretarioj
PEDRO ELIAS DIAS
JOSÉ CORREIA
ZAIRA LEAL

Direktoro
PAULO GUILHERME

Redaktoroj
A. K. AFONSO COSTA
Belo Horizonte, MG.
BENEDICTO SILVA
Monte Aprazível, S.P.
D. PEREIRA DE SOUZA
Rio de Janeiro, GB.

Manuskriptoj estu tajpitaj sur unu flanko de la papero kun kopio kaj interlinia spaco kaj iom larĝa marĝeno. Traduko kaj represo de artikoloj kaj redaktaĵoj estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton. "Esperanto-Aldono" estas ricevebla laŭ peto. Tekstoj subskribitaj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

****

"Fé inabalável só é a que pode encarar frente a frente a razão, em tôdas as épocas da Humanidade."

Allan Kardec

****

La Laboristoj de la Sinjoro

5. Alproksimiĝas la tempo, kiam realiĝos la aferoj antaŭditaj por la transformiĝo de la homaro; feliĉaj estos tiuj, kiuj estos laborintaj sur la kampo de la Sinjoro kun malegoismo kaj sen alia motivo ol karito! iliaj labortagoj estos pagitaj centoble pli, ol kiom ili esperis. Feliĉaj estos tiuj, kiuj diris al siaj fratoj: "Fratoj, ni kune laboradu kaj ni kunigu niajn klopodojn, por ke la mastro, alveninte, trovu finita la laboron"; ĉar la mastro diros al ili; "Venu al mi, vi, kiuj estas bonaj servantoj, vi, kiuj silentigis viajn ĵaluzojn kaj viajn malpacojn, por ne allasi malutilon en la verkon!" Sed ve al tiuj, kiuj pro siaj malkonkordoj malfruigis la horon de la rikolto; ĉar la ventego venos kaj ilin forportos la ciklono! ili krios: "Pardonu! Pardonu!" Sed la Sinjoro diros al ili: "Kial vi petas pardonon, vi, kiuj subpremis la malfortulon, anstataŭ lin subteni? Kial vi petas pardonon, vi, kiuj serĉis vian rekompencon en la ĝojoj de la tero kaj en la kontentigo de via fiero? Vi jam ricevis vian rekompencon, kia vi ĝin volis; ne petu pli: la ĉielaj rekompencon estas destinataj por tiuj, kiuj ne petis la surterajn rekompencojn."

Dio faras en la nuna momento la denombradon de Siaj fidelaj servantoj kaj jam markis per Sia fingro tiujn, kies sindonemo estas nur ŝajna, por ke ili ne uzurpu la salajron de la kuraĝaj servantoj, ĉar nur al la homoj, kiuj ne hezitas ĉe sia tasko, Li konfidos la plej malfacilajn postenojn en la granda laboro de rebonigo per Spiritismo. Tiam plenumiĝos tiu ĉi parolo: La unuaj estos lastaj, kaj la lastaj estos unuaj en la regno de la ĉielo!" (La Spirito de Vero. Parizo, 1862) El la Evangelio laŭ Spiritismo - esperantigita de nia karmemora Majstro Iŝmael Gomes Braga, (xx-a ĉap.)

●●●●●

Leteretoj al niaj ŝatataj geamikoj

Montevideo - Urugvajo. - Prof. Francisco Mário Caimi. Ni legis vian leteron kun granda intereso. Ni jam ĝin respondis kaj plene konsentas pri via propono. Ni bone komprenas, ke laŭdinda estas via laboro por la klarigo ĝenerale. Plenan sukceson, kara s-ano!

Varsovio - Pollando. - S-ano Roman Siemiatkowski. - alvenis viaj ŝatataj leteroj de la 13. XI. 1968 kaj 5. I. 1969. Ankaŭ alvenis la verko pri Silezio, dankon. Ĉar vi diris, ke ricevas "E-A-on" pere de iu s-ano el S. Paulo, ni ne ĝin sendos rekte al vi. Tamen, se vi opinios, ke tio estas necesa, bonvolu sciigi nin. Ni ĝojos plenumi viajn ordojn, kaj intertempe ni salutas vin sincere. La venontan monaton ni sendos leteron.

(Daŭrigo sur paĝo 4-a)

- FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER -

8-7-1927 40 ANOS DE MEDIUNIDADE 8-7-1967

(Cont. da pág. 6 do n.º 55)

(Transcrito de "A FLAMA ESPÍRITA")

Reportagem de José Thomas da Silva Sobrinho

FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER

No campo da ASSISTÊNCIA SOCIAL já promoveu diversos festivais, distribuindo até hoje milhares de quilos de arroz, feijão, açucar, batatas, café, macarrão, fubá, cobertores e até mesmo material escolar para as crianças pobres.

A CEC mantém ainda um AMBULATÓRIO MÉDICO, onde encontramos bastante profícua a atividade dos abnegados médicos, nossos confrades, drs. Elias Barbosa (prof. de Farmacologia da Faculdade Federal do Medicina do Triângulo Mineiro) e José da Silva Madeira (próf. Assistente de Psiquiatria da mesma Faculdade), atendendo em média de 72 pacientes por dia, inclusive, com medicamentos inteiramente gratuitos.

O Departamento de ENXOVAIS PARA RECEM NASCIDOS desempenha, pela mesma forma, papel nobre com uma distribuição de centenas de enxovaizinhos por ano.

Em tôrno de tudo, Chico está presente. Orientando. Ajudando. Trabalhando em favor dos mais necessitados. A presidência da Comunhão Espírita Cristã vem sendo exercida, há muito, pela nossa confreira, Dalva Rodrigues Borges.

ENTREVISTA COM EMMANUEL

Pergunta: Com a difusão da luz espiritual, alargará o homem a noção de pátria, de modo a abranger no mesmo nível todas as nações do mundo?

Resposta: — A Luz espiritual dará aos homens um conceito novo de pátria, de maneira a proscrever-se o movimento destruidor pelos canhões e balas homicidas.

Quando isso se verifique, o homem aprenderá a valorizar o berço em que nasceu, pelo trabalho e pelo amor, destruindo-se concomitantemente as fronteiras materiais e dando lugar à era nova da grande família humana, em que as raças serão substituidas pelas almas e em que a pátria será honrada, não com a morte, mas com a vida bem aplicada e bem vivida.

Pergunta: A humanidade terrestre é idêntica à doutros orbes?

Resposta: — Nas expressões física, semelhante analogia é impossível, em face das leis substanciais que regem cada plano evolutivo; mas, procuremos entender por humanidade a família espiritual de todas as criaturas de Deus que povoam o Universo e, examinada a questão sob esse prisma, veremos a comunidade terrestre identificada com a coletividade universal.

Pergunta: Qual a melhor escola de preparação das almas reencarnadas na Terra?

— Resposta: A melhor escola ainda é o lar, onde a criatura deve receber as bases do sentimento e do caráter.

Os Estabelecimentos de ensino, pròpriamente do mundo, podem instruir, mas só o institu.o da família pode educar. E' por essa razão que a universidade poderá fazer o cidadão, mas sòmente o lar pode edificar o homem.

Na sua grandiosa tarefa de cristianização, essa é a profunda finalidade do Espiritismo evangélico, no sentido de iluminar a consciência da criatura, a fim de que o lar se refaça e novo ciclo de progresso espiritual se traduza, entre os homens, em lares cristãos, para a nova era da Humanidade.

Pergunta: Que espera o homem desencarnado, diretamente, nos seus primeiros tempos da vida de além-túmulo?

Resposta: — A Alma desencarnada procura naturalmente as atividades que lhe eram prediletas nos círculos da vida material, obedecendo aos laços afins, tal qual se verifica nas sociedades do vosso mundo.

(cont. no próx. n.º)

****

Rekviemo

(Dediĉita al mia pereinta filineto Tanja)

Nur unu malgranda, terura tempero,
nur unu vekkrio en freŝa aero,
nur unu korpeto sur kota pavimo
de stratakcidento, senkulpa viktimo.

La cerbo frapita rifuzas kompreni,
la nervoj streĉitaj ne povas elteni...
Kapeto rompita, maneto ĉe l' sino,
kaj rozoj el sango de mia filino...

Ho Tanja, ho Tanja amata vekiĝu,
de la koto sangumita rapide leviĝu
Kaj iru al viaj gepatroj mizeraj,
al ni kiuj perdis la lastan esperon!

Sed vane ne krias, kaj vokas kaj ĝemas
Neniam amata filino revenos.
Estingis la radoj de l' vivo fajreron
Kaj sian korpeton englutis la tero...

PETRO POLIŜĈUK
(rusa poeto)

****

(De paĝo 2-a)

Bagé - Juna amiko Pedro Gents. Dankon pro via komplezo. Niaopinie la kunlaborado inter junaj esperantistoj-spiritistoj kun la pli aĝaj estas absolute necesa. La doktriniga laboro sur la spirita kampo postulas la helpon de la sperto. Ĉu vi ne samopinias? Akceptu niajn gratulojn pro via agado sur la kulturkampo de la Sinjoro. Antaŭen!

Litovio. - S-ano Antanas Zastartas, Skuodas, Vytauto 29 - Via letero de la 7-XII-1968 tre plaĉis al ni. Jes, kara s-ano, via korespondanto en S. Paulo, efektive estas nia ŝatata amiko Carlos Castanho, tre afabla kaj komplezema homo. Vi povas kredi, ke nia modesta gazeto ĉiumonate vin vizitos. Sendube, s-ano, Spiritismo interesas multajn personojn, ĉar ĝi efektive estas la promesita Konsolanto. Spiritismo certigas tion, kion Jesuo diris pri la Konsolanto: scion de la aferoj, per kiu la homo scias, de kie li venas, kien li iras, kaj kial li estas sur la tero; ĝi revokas la homon al la veraj principoj de la leĝo de Dio, kaj lin konsolas per la fido kaj la espero. Ni rekomendas nin al via memoro, kaj ni plezure atendos viajn venontajn leterojn. Saluton, s-ano!

Pôrto Alegre. - S-ano G. Otto Vaske. Kun plezuro ni notis vian novan adreson kaj vi povas esti certa, ke ni oportune vizitos vin. Baldaŭe ni sendos la adresojn, kiujn vi volas. Daŭrigu sendante viajn leteretojn. Pli bona io, ol nenio, estimata s-ano! Ricevu niajn korajn komplimentojn.

Odry - Ĉeĥoslovakio - S-ano B. Petera. Saluton, amiko! Via poŝtkarto atingis nin tre prokrastita. Laste la poŝtsendoj el tie alvenas tute neregule. Ni kore dankas vian memorajon kaj reciprokas viajn bondezirojn por la novjaro 1969. Ni akurate sendas nian gazeteton al vi. Ĉu vi ĝin ricevas? Via adreso estas iomete konfuza, bonvolu klarigi ĝin.

Ribeirão Prêto - SP. — Prof. João Pedro Miranda. Akceptu nian sinceran manprenon kaj samtempe dankojn pro via sendita salutkarto, kiu estas tre kara al ni. Ni ĝojas scii ke vi entuziasme estas ĉe via posteno! Al vi kaj al viaj karaj familianoj niajn plej korajn bondezirojn de feliĉo, paco kaj prospero.

Guaçui - Esp. Santo — Samideanino Shyrlene Soares. Ni dankas viajn sendaĵojn. Bedaŭrinde pro malatento de nia reviziisto la poemo de via amiko el Ruslando eliris ne bonorde. Pardonu nin, sed ni ĝin reeldonos en nia proksima numero. Tute je via ordo kaj akceptu niajn korajn salutojn.

Sant'ana de Parnaiba - SP. — Kunfrato Rubens Moura Vignol. Via kara patrino kaj nia estimata amikino sinjorino Amelia transdonis al ni la gratulojn, kiujn vi afable sendis pro nia modesta klopodo favore al nia kara Idealo. Viaj koraj vortoj kuraĝigas nin por plua laborado. Nia gazeto vizitos vin. Al vi kaj familio ni sendas bondezirojn de bona sano, feliĉo kaj prospero. Viaj familianoj, kiuj loĝas en tiu ĉi urbo estas sen novaĵo kaj bonfartas. Mi pensas, ke vi ankaŭ estas dezirema scii ion pri la maljuna estro de la grupo kaj tial mi iras renkonte al via deziro. Momente li estas antaŭ mi kaj karese glatigas la mentonon, ridetas kaj... alparolas. Mi atente aŭskultas lian agrablan konversacio. Li estas afabla kaj bonkora sinjoro, ĉu ne? Bone, mia kara kunfrato Rubens, ĝis revido!

(De paĝo 1-a)

Studante tiujn faktojn, Allan Kardec publikigis de 1857 ĝis 1869 tre interesajn librojn, el kiuj jam aperis en Esperanto la plej gravaj, nome "Libro de la Spiritoj", "La Libro de la Mediumoj, "La Evangelio laŭ Spiritismo".

Ĉar la faktoj nun nomataj spiritismaj ripetiĝas spontanee en ĉiuj lokoj kaj en ĉiuj tempoj. Spiritismo nepre varbos al si en la estonteco la tutan mondon, simile kiel ĉiuj aliaj veraĵoj apogataj sur faktoj. Ĝi ne estas ia religia sekto de iuj homoj, kiel tiom da aliaj. En la estonteco ĝi apartenos al ĉiuj.

Ĉiuj atakoj, kontraŭdiroj, persekutoj, kalumnioj estos vanaj kaj tiel ridindaj kiel la iama malkonsento pri la movoj de la Tero kaj pri ekzisto de antipodanoj,

Nur nescio fanatike neas sen antaŭa studado de la temo diskutata. - (El la libro "Kio Estas Spiritismo"), traduko de Profesoroj Porto Carreiro Neto kaj Ismael Gomes Braga.